CNT AIT FAI

INTERNACIA LABORIST-ASOCIO

# INFORMA BULTENO

NACIA KONFEDERACIO DE L'LABORO

ADRESO: ESPERANTO-FAKO Av. DURRUTI 32-34
BARCELONO — HISPANIO

IBERIA ANARKISTA FEDERACIO

II-a jaro | 25 NOVEMBRO 1937 | Numeros 9 - 10



# DURRUTI - Sinonimo de la Hispana Revolucio

La anarkismo disponas galerion da elstaraj k eminentaj homoj. Prudhon malfermis breĉon en la filosofio, malkovrante, ke la propreco estas rabaĵo. Reclûs alprenas internacian renomon inter la scienculoj, historiante la vivon de la Homaro k Naturo. Bakunin tremigas per sia revolucia varmeco ĉiujn tiranojn. Kroptkin estas ekzemplo de la relativeco de la ekonomia determinismo, seniĝante de la reĝecaj ornamaĵo por lukti k suferi por la Anarkio. Centojn da eltaraj homoj ni povus citi. Al la flanko de ĉiuj figuras Durruti, simbolo de tuteco, energio k integreco.

Fekundaj verkistoj, ĉarmaj poetoj, renomaj artistoj, la floraro de la literaturo, poezio k de la arto sublimigis kelkiam la vivon de personoj, kiuj ne havis alian virton ol sian monon aŭ sian politikan signifon. Generaloj profesiaj de la krimo, reĝoj despotecaj k malhumilaj, aristokrataj prostituinoj, politikuloj sen moralaj skrupuloj, rabistoj de la Bankaro k Borso, industriaj kapitanoj, armilkomercistoj, la tuta socia skorio kovrita per brilaj silk- k orropoj havis sian rimarkindan biografon k apologanton, kiu humiliĝis antaŭ la mono k sia socia signifo. La oficiala historio ne estas pli ol serio da biografioj de personoj senutilaj, frivolaj, perversaj. Ni ne povas biografii Durruti-n detale k amplekse.

Ni faros simple skizeton pri lia vivo, k ni eksplikos lakone la influon, kiun havis Durruti en la politika, socia k revolucia vivo de Hispanio.

* * *

Buenaventura Durruti naskiĝis en Leon la 14an de Julio 1896. Filo de laborista familio, li kreskis en la kruda medio de la Leonaj laboristoj. Lia patro estis socialisto k luktadis por la socialismo. Preskaŭ infano Durruti partoprenis la socialistajn kunvenojn. La laboristaj problemoj malkvietigis lin... Lia infana menso komprenis tuj, ke la socio estas malbone organizita. La grandaj proletaj strikoj de Leon k Asturio envolvis Durruti-n en medio febre revolucia. Lia temperamento estis forta kiel lia fizika strukturo. Je 14 jaroj jam estis sperta mekanikisto k laboris en la fervojaj fabrikoj de Leon. La laboro, por li estis kulto. Dum la noktoj iradis al la Sindikato por ŝanĝi impresojn k diskuti kun la kamaradoj.

La fervojistaj laboristoj vivis tiam en tre mizera situacio. La fervojentreprenistoj spekulacis la forton k la malsaton de la laboristoj. La fervojistoj estis malkontentaj k postulis pli bonajn vivkondiĉojn. Ili ne povis vivi per la salajroj tiel malaltaj. Oni okazigis kunvenojn, kunsidojn k mitingojn. Durruti partoprenis ĉiujn, intervenante en la diskutoj. La atmosfero estis ĉiufoje pli densa k divenigis ekplodiĝon.

La politika situacio estis ankaŭ tre kritika. La socialistoj k la respublikanoj kredis, ke jam alvenis la momento forskui la Monarkion, reĝimo arkaika k kaduka, kiu ne respondis al la momentaj bezonoj k kiu fariĝis senpopulara k malama kelkiam.

Forĝiĝis revolucia movado, kiu devis komenciĝi per ĝenerala striko de la fervojistaj laboristoj de la tuta lando.

Eksplodis la striko. La ŝtatforto murdis multajn strikintojn, k Durruti ekkonis la rigorojn de la persekuto, vidante sin devigata ellandiĝi.

Francio fariĝinta rifuĝejo por la hispanoj persekutataj de la monarkia registaro, akceptis Durruti-n. En Parizo li laboris dum tri jaroj kiel mekanikisto. La kamaradoj el Hispanio skribis al li, informante lin pri la politika k socia situacio de la lando. Ili skribis al li, ke la anarkista movado ĉiufoje akiris pli grandan amplekson; ke C. N. T. jam grupigas pli ol milionon da laboristoj; k la respublikanoj estis pretaj leviĝi; ke la forfalo de la Monarkio estas konsiderata tuja; ke la popolo estas pretigita por la revolucio; ke la burĝaro k la registaro organizis bandojn da pistolistoj por elimini la batalantojn pli agemajn de la anarkismo, de C. N. T. k de la maldekstro respublikanismo... Durruti, homo malkvieta, pura revolucia spirito, trapasis la francan landlimon k revenis al Hispanio, preta disponigi sian tutan forton al la revolucio. En San Sebastian batalis en la anarikistaj grupoj, k konspiris kontraŭ la Monarkio. Kun Francisco Ascaso, Jover k García Oliver li formis agradan grupon.

La oficiala pistolismo semadis en Barcelono teroron inter la vicoj de la laboristoj. La prezidanto de la registaro Dato subvenciis oficiale la murdistojn de la laboristoj... Dato estis forigita. La grupo de Durruti ja ekagis en Barcelono. Ĝi estis la grupo de defendo de la anoj de C. N. T. k de la anarkismo. La gubernestro Martinez Anido k la policestro Arlegui makulis per krimoj Barcelonon. G. Oliver, Ascaso, Jover k Durruti per pistoloj defendis la laboristojn kontraŭ la murdistoj.

La hispana laborista klaso vidis en ili siajn plej bonajn defendantojn. Por defendi la laboristojn ili riskis ĉiutage sian vivon. Ili trompis k mistifiks neniun. Kiam estis realigenda malfacila afero, ili estis la unuaj plenumantoj. Pro tio la popolo amis k estimis ilin.

La aŭtoritatuloj malkovris la laboron, kiun faris la grupo de Durruti, k ciuj ĝies partoprenantoj estis senkompate persekutataj. Ascaso k Durruti devis forkuri el Hispanio. Ili rifuĝis en Argentinio. Tie laboris, organizis laboristajn sindikatojn k paroladis en la mitingoj. La argentinaj anarkistoj ricevis mirindan reforton kun la kunlaboro de Ascaso k Durruti, kiuj donis fortan impulson al la propagando k la liberecana agado en la Sudamerika Respubliko. La policanaro fiksis okulojn al ili k ekpersekutis ilin. Ree komenciĝis la pilgrimado de niaj kamaradoj. Ili krozadis —ĉiam persekutataj de la servistoj de la burĝaro— Urugvay, Paragvay, Chile, Perú, Meksikio... reveturante poste al Eŭropo.

Parizo estis rifuĝejo de ĉiuj persekutatoj de la mondo. Durruti ekkonis en la franca ĉefurbo la pli agemajn figurojn de la internacia anarkismo, viktimoj de la premado de la respektivaj registaroj.

En modesta ĉarpentrejo laboris la fama rusa batalanto liberecana Néstor Makno. Makno kiel Durruti estis homo de la agado. La kamparanoj de Ukrajnio adoris lin kiel dion. Makno ĉekape de siaj kunbatalantoj faris la anarkistan revolucion en Ukrajnio. Durruti admiris la ukrajnan bravulon k estis lia intima amiko. Inter ambaŭ ekzistis analogio de karaktero k sama interpreto de la revolucia agado.

En Hispanio stariĝis la diktaturo de Primo de Rivera kun la interveno de la reĝo. La revolucia laborista movado estis deklarita ekster la leĝo. La batalantoj de

C. N. T. estis ĉiuj en la karceroj aŭ en ekzilo. Ascaso k Durruti decidis finigi la ĥaosan situacion politikan k socian de Hispanio k estis preparantaj atencon kontraŭ Alfonso 13. Oni malkovris la atencon kontraŭ la reĝo de Hispanio, k Ascaso k Durruti estis enkarcerigitaj en la fama "Conciergerie", okupante la saman ĉambreton, kiun okupis Maria Antoineta en 1793.

La francaj anarkistoj entreprenis aktivan kampanjon favore al Ascaso k Durruti. La ceteraj gazetoj aliĝis al ĝi. Elstaraj figuroj de la hispania respublikanismo, rifuĝintaj en Francio, propetis la liberigon de la du kamaradoj. Ĉi kampanjo alprenis internacian karakteron, ĉar la registaro de Argentinio petis la transdonon de la detenitoj pro supoza delikto, kiun ili estas farintaj en Argentinio k pro kiu estis kondamnitaj al morto.

Post unujara karcero la franca registaro dekretis ties liberigon admonante ilin forlasi Francion en daŭro de du semajnoj kune kun Joven, k Liberto Callejas. Ili direktis sin al Bruselo. Poste al Luksemburgo. Ĉie estis persekutataj de la socialdemokrata policanaro.

Elmetante sin al ĉiuklasaj danĝeroj, ili revenis al Parizo. La plej elstaraj figuroj de la internacia anarkismo, kiuj troviĝis en Parizo, ekideis krei Internacian Librovendejon, kiu havis kiel mision eldoni la plej gravajn anarkistajn verkojn en ĉiuj lingvoj.

Post la proklamo de la Respubliko la kamaradoj provis translokigi la librejon al Hispanio, sed la francaj ĝendarmoj en Aduana de Port-Bou antaŭforigis ĉian eblon.

Al Ascaso k Durruti neniu patrono donis laboron... Ekonomie ili pasigis multajn seniĝojn. Fine ili trovis laboron en Lyon, sed estis malkovritaj de la polico k kondamnitaj al 6 monatoj da karcero. Kiam plenumis la imponitan kondamnon, ili revenis al Bruselo. Tie estis Macia, Gassol k aliaj elementoj katalanistaj k respublikanaj. Macia alvokis Ascaso-n k Durruti-n por partopreni aktive en la komploto, kiu estis forĝata en Francio k Belgio kontraŭ la hispania diktaturo. Kiel revoluciuloj, niaj kamaradoj ne neis kunlabori en la komploto.

La proklamo de la Respubliko, kiu estis konformita de la maljunaj monarkianoj por evitigi la disvolvon de la revolucia impeto de la laboristaj amasoj, malfermis periodon de profundaj agitoj socialaj en Hispanio, en kiuj Durruti ludis unuagradan rolon.

**La liberecana revolucio de Fígols.** — Post la proklamo de la Respubliko Durruti k Ascaso revenis al Barcelono, kiel miloj da liberecanoj, kiuj troviĝis en ekzilo.

La Barcelona loĝantaro ne konis Durruti-n kiel agitanton, sed simple kiel homon de la agado. C. N. T. k F. A. I. profitis la reĝimŝanĝon por disvastigi la anarkisman propagandon k por reorganizi la sindikatajn kadrojn. La relativa libero, kiu regis, plifaciligis la laboron prozelitan k organizan. Centoj da mitingoj okazis tra la tuta Katalunio, dum kiuj la forta k sentimenta voĉo de Durruti resonadis kun revolucia tono. Ĉiudimanĉe F. A. I. organizis mitingon en la vastaj placoj de la Parko de Montjuich. La oratoroj estis preskaŭ ĉiam la samaj: Cano Ruiz, Fr. Ascaso, A. Parera, G. Oliver k Durruti. En la unuaj aktoj, ĉeestis nur kelkaj centoj da personoj. Kiam tamen la publiko ekkonis la kvaliton de la oratoroj, antaŭ ĉio G. Oliver k Durruti, rezultis malgrandaj la placoj de Montjuich, en kiuj ĉiudimanĉe kunvenis miloj k miloj da laboristoj.

Kreiĝis en Katalunio k aparte en Barcelono rondonete revolucia. Durruti ne estis eksterordinara oratoro: liaj diskursoj estis preskaŭ ĉiam impovisitaj. Al li mankis ritorikeco. Tamen li estis la elemento, kiu venigis la plejan publikon al la mitingoj. Lia voĉo, tre forta k serena, sugestadis al la amasoj. Li paroladis kun multa simpleco, senbombaste, k la eksterordinara altiro, kiun li ekzercadis super la amasoj, radikis en granda kvanto da sentimentoj, kiajn li enmetadis en siaj vortoj. Ne estis malofte vidi homojn k viriniojn kun eklarmantaj okuloj, aŭskultante Durruti-n. En ioma tempo nia kamarado estis konsiderita kiel idolo de la amasoj.

La kamaradoj de Gerona invitis iun tagon Durruti-n paroladi en mitingo, kiun ili organizis tie. Li akceptis la inviton. Post la mitingo Durruti estis retenita. Oni akuzis lin pro atenco, kiun li preparis en Parizo kontraŭ la reĝo Alfonso 13! La juĝaŭtoritatuloj ankoraŭ ne konis, ke oni dekretis ĝeneralan amnistion k ke Alfonso 13 estis detronita pro la proklamo de la Respubliko. La loĝantaro de Gerona ribelis. Ĝi provis plurfoje ataki la karceron postulante la liberigon de Durruti. La laboristoj deklaris ĝeneralan strikon sendifinan, k la aŭtoritatuloj proklamis militstaton. Sed Durruti estis liberigita je la tria tago de la striko. La popolo, kiel ĉiam, triumfis en sia projusta entrepreno.

En Hispanio estis tradicio memorigi La Unuan de Majo kiel tago de la proleta agitado. La Unua de Majo de 1931 havis karakteron de revolucio en Barcelono. Oni okazigis grandiozan mitingon en la salono de la Belartoj, kiun ĉeestis grandnombro da personoj jus amnistiitaj. Poste organiziĝis grandioza manifestacio, je kies frunto iris G. Oliver, Durruti, Ascaso, S. Bilbao k aliaj batalantoj de C. N. T. k F. A. I. Ĉi tiu manifestacio, kiu trapasis la ĉefstratojn de la urbo, estis la unua rekalkulo de la proletaj fortoj, post la stariĝo de la Respubliko. Kiam la amaso venis fronte al la Ĝeneralitatejo, ĝi estis atakita de la policaro. Oni aŭdigis centojn da pafoj. La afero ekstreme graviĝis, k devis interveni la armeo. Patrolo da soldatoj aperis sur la placo. Durruti alparolis la soldatojn. Kiam la gvardioj de la Sekureco k la Civila Gvardio provis denove ataki la manifestantojn, la soldatoj, obeante la indikojn de Durruti, direktis la fusilojn al la gvardioj k evitis la masakron.

Ĉi epozodo estis simptomo de tio, kio devis okazi pli poste. La politiko alprenis sian antaŭan karakteron. De la respondecaj postenoj ne estis forigitaj la elementoj, kiuj antaŭe servis al la Monarkio. La komando de la armitaj fortoj estis en la povo de reakciaj elementoj. Al la Respubliko mankis socia politiko, kiu povus pliboniĝi la staton de la laborista klaso. La reĝimŝanĝo renovigis absolute nenion. Ĉio sekvis kiel en la tempoj de Alfonso 13. Aperis malkontento.

Durruti diris al la laboristoj, ke estas necese reentretreni la revolucion, kiun perfidis la respublikanoj, k la socialistoj. Kun Perez Combina k A. Parera li iris al Fígols. Durruti diris al la ministoj, ke la burĝa demokratio frakasis, ke estas necese realigi la revolucion; ke la tuteca emancipiĝo de la laborista klaso estas atingebla nur pere de la eksproprigo de la socia riĉaĵaro, kiun tenis la burĝaro k la ŝtato. Li konsilis la ministojn de Fígols pretigi sin por la finala lukto, k li montris al ili la kielon fabriki bombojn.

La agitado disvastiĝis tra la tuta lando. La kampa-

ranoj batalis ĉiutage kontraŭ la Civila Gvardio, kiu defendis la grandajn terposedantojn. Ĉie elŝprucis strikoj. La registaro de la Respubliko troviĝis antaŭ la dilemo apogi la laboristojn aŭ defendi la burĝaron. Kiel estis nature, ĝi decidis por la lasta.

La konfliktoj inter la kapitalo k la laboro plikrudiĝis. La 19an de Januaro 1932 la ministoj de Fígols leviĝis per armiloj kontraŭ la regiona burĝaro. La revolucia movado disvastiĝis tra Cardoner, Alto Llobregat. Fígols, Bergo, Suria, Cardona, Gironella k Sallet estis en revolucia flamo. En tiuj lokoj por unua fojo en ia Historio stariĝis la Libera Komunismo.

Post 8 tagoj la armeo de la Respubliko sufokigis la movadon. En Barcelono centoj da laboristoj estis ekzilitaj al Afriko. Inter ili troviĝis kamarado Durruti, Ascaso, Cano Ruiz k aliaj elstaraj elementoj de C. N. T. k F. A. I.

Durruti figuris ĉiam inter la viktimoj de la premado, ĉar lia personeco estis intime nitita al la revolucia movado, kiu estis ekbolanta en Hispanio.

**De Januaro 1933 ĝis oktobro 1934.** — En la fino de Novembro 1932 la ekzilitaj kamaradoj revenis al Hispanio. C. N. T. suferis sisteman persekutadon flanke de la respublikanosocialista registaro... F. A. I. organizis mitingon en la solano de la Dekoraciaj Artoj de Montjuich. Intervenis Durruti, por unua fojo li paroladis en Barcelono post sia reveno. Oni kalkulas, ke la mitingon ĉeestis ĉirkaŭ 10.000 personoj. Durruti refirmigis sian fidon en la revolucio. La ekzilo plifortigis ja lian spiriton. La polico estis instalita grandnombre maŝinpafilojn en la ĉirkaŭjoj. La mitingo estis revolucia jeso. Miloj da personoj eliris de la akto, aklamante F. A. I.-on k la socian revolucion.

Ektremis la kataluna burĝaro. La gazetaro rekomendis al la registaro duran manon kontraŭ la anarkistoj. Oni fermis la sindikatojn de C. N. T. "Solidaridad Obrera", estis malaperigita. Centoj da batalantoj estis enkarcerigitaj. Tuj la anarkistaj rondoj ekhavis la ideon reagi perforte al la registara premado. Konflikto de tia natureco signifus seriozan malordigon por la politiko k la ekonomio de la lando. La registaro timigis la laboristojn, dirante, ke ĝi militarigos la fervojistojn. Oni pripensis profiti la probablan strikon de la fervojistoj por komencigi la revolucion. García Oliver projektis revolucian planon. La kamaradoj Ascaso, Durruti, Joven, A. Fernándes, Sans, Eroles k aliaj elstaraj elementoj konsentis la projekton de Oliver.

Nepripensita faro tamen antaŭigis la okazontaĵojn. La k-doj H Estaban k Méler montis laborejon por eksplodiloj en la kvartalo Clod. Produktiĝis eksplodo en la laborejo k la polico malkovris kelkajn deponejon da eksplodaĵoj. Estis necese komencigi la revolucion antaŭ ol la tuta materialo, kiun posedis la anarkistoj, falos en la manojn de la aŭtoritatuloj. La grupoj de agado k la Kadroj de Defendo de C. N. T. sieĝis la soldatejojn la 8an de Januaro 1933.

La movado disvastiĝis preskaŭ tra ĉiuj regionoj de Hispanio. La revolucio estis sufokigita de la registraro. Oni atendis ŝanĝon de la politiko rilate al la laborista k anarkista movado. Sed ne estis tiel. La premado daŭris. La anarkistoj ne povis subiĝi al la reĝimo de oficiala teroro. K ili konspiris kontraŭ la respubliko.

La laboristaj amasoj, kiuj vidis siajn reprezentantojn en la karceroj, malamis la respublikon. La dekstrularo gajnis mediojn. La partianoj de Lerroux (Lero) k Gil Robles gajnis la baloton. Durruti diris en grandioza mitingo, okazigita en la Monumenta Placo de Barcelono, ke al la triumfo de la dekstrularo oni devas respondi per revolucio. La maldekstraj respublikanoj k la socialistoj cedis la povon al la radikalaj k reakciaj fortoj.

C. N. T. aliĝis al la propono prirevolucia, anoncante ĝin oficiale. Garcia Oliver pro la frakaso de Januaro konsideris malprudenta kion proponis C. N. T. Unuafoje en sia longa amika vivo Durruti diferencis kun Oliver k subtenis la revolucian tezon. Durruti iris al Zaragozo por koordini la movadon, kiu eksplodis la 8.an de Decembro, la saman tagon, en kiu kunvenis la kontraŭrevolucia parlamento. La armita batalo daŭris dum pli ol du semajnoj. Finfine la movado estis sufokita. La respublikanoj estis prezentintaj servon al la reakciaj elementoj, al la samaj elementoj, kiuj la 19an de Julio 1936 volis leviĝi kontraŭ la respubliko por starigi faŝisman reĝimon. Durruti estis retenita, kiel ankaŭ ĉiuj anoj de la Nacia Revolucia Komitato, inter kiuj figuris Cipriano Mera, k doktoro Isaak Puente, kiu estis fusilmortigita de la faŝistoj en Hueska.

Post la revolucio de Decembro pligrandiĝis la figuro de Durruti. La laboristoj de Zaragozo subtenis ĝeneralan strikon dum monato por atingi la liberon de Durruti k liaj samsortanoj. La agado de la loĝantaro devigis la registaron dekreti partecan amnistion. Durruti estis liberigita.

La dekstraj partioj disvolvadis sian propagandon tra la Hispanio, forigante el la respondecaj postenoj la respublikanojn k la socialistojn. Ĉi tuj ekvidis sian gravan eraron. En la socialistaj medioj oni ekparolis pri revolucio. Ili aprobis la revolucian linion de la anarkistoj. La striko de la kamparanoj de Junio, inspirata de la socialistoj estis asufonita kun kolektiva masakro de kamparanoj. La Civila Gvardio faris al la socialistoj tion kion oni afris antaŭe al la laboristoj de C. N. T. k la anarkistoj de F. A. I.

Formiĝis dekstra registaro. La respublikanaj partioj rompis kun la reĝimo, k produktiĝis la socialista revolucio de Oktobro. Al la socialista revolucio aliĝis la respublikanoj de Katalunio, k ilia unua mezuro estis enkarcerigi la anarkistojn por eviti, ke ili influu al la okazontaĵoj. Inter la retenitoj figuris Durruti.




**Durruti eliras al Aragono**

Durruti-n ni vidas ĉiam ligita al la grandaj sociaj k politikaj procezoj de la lando.

**Durruti k la baloto de Februaro.** — El la karcero Durruti estis kondukita al Valencio. Kiam estis liberigita, li pensis multe pri la revolucio.

La tuta mondo rekonis, ke la frakaso de la burĝa demokratio metis en la manoj de la proletaro la sorton de la revolucio. Oni ekparolis tuj pri la revolucia laborista alianco. Garcia Oliver donis lozungon: la marksanoj al U. G. T. k la anarkistoj al C. N. T., ambaŭ organizoj unuigitaj en agado kontraŭ la kapitalismo. En la kongreso, kiun okazigis C. N. T. en Zaragozo en Majo 1936, oni decidis starigi revolucian pakton kun U. G. T. kun la kondiĉo, ke la laboristaj socialistoj deklaros publike, ke rompis kun la burĝaj partioj.

Durruti akceptis la lozungon k propagandis pri ĝi. Sed prezentiĝis alia problemo: La baloto de Februaro, de kies rezulto dependis la futuro de la demokratio k de la faŝismo. En la karceroj de Hispanio troviĝis 30.000 politikaj k sociaj malliberigitoj, la plimulto el ili anarkistoj. La maldekstraj partioj promesis la liberon de ĉiuj, se gajnos la baloton. La dekstraj anoncis novajn metodojn de persekuto kontraŭ la revoluciaj laboristoj. Se C. N. T. dirus al la laboristoj voĉdoniĝi endanĝerigus la liberon de 30.000 homoj. Kontraste, se konsilus la voĉdonon, aprobus la parlamentismon, ĉiam neatan de la anarkismo.

Durruti trovis formulon, kiu savis principe la respondecon, en kiu povis enfali C. N. T. k la anarkistoj en la rezulto de la baloto. La maldekstraj diris, ke se la dekstraj gajnos la baloton, ili okazigos la revolucion. La dekstraj certigis ,ke se gajnos la maldekstraj, provokos civilan militon. Durruti en ĉiuj mitingoj ripetadis la frazon: "Ni troviĝas antaŭ la revolucio aŭ la civila milito. La laboristo, kiu voĉdonos k poste restas trankvila en sia domo, estos kontraŭrevoluciulo. K la laboristo, kiu ne voĉdonos k restas en sia domo, estos alia kontraŭrevoluciulo."

C. N. T. ne faris detenan kampanjon. Ĝi faris revolucian laboron. La laboristoj en sia plimulto voĉdonis.



La morte vundita Durruti

Gajnis la maldekstraj. K la civila milito ekkovis. La gajno de la baloto estas ŝuldata multe al Durruti. Nia kamarado havis eksterodinaran iniciatemon.

Durruti ne estis intelektulo. Eble en sia vivo li ne skribis pli ol du artikolojn. Li estis homo de la agado. Laboristo. Li neniam vivis sen labori. La laborejo, la fabriko k la sindikato estis liaj batalejoj. Kiam revenis el eksterlando li laboris en la teksaĵa industrio. Li opi-






Durruti - Kolette, la filineto de Durruti

niis, ke la batalantoj devas neniam forlasi la laboron. Lia normo estis labori ĉiam. Tage—en la fabriko, nokte—en la sindikato. Kiam li paroladis kontraŭ la politikistoj k la burĝaro, la laboristoj vidis en li kamaradon de laboro, kiu vivis, suferis k batalis kun la laboristoj. La tuta morala aŭtoritato de Durruti radikis ne en tio kion li diris, sed en lia konduto, ĉiam modela k fajra.

**La 19 de Julio 1936 k la kolono "Durruti".** — La lasta kongreso, kiun C. N. T. okazigis en Zaragozo, estis la kongreso de la revolucio. La prenitaj decidoj akcelis la militistan ribelon. C. N. T. k U. G. T. estis unuiĝantaj por realigi la proletan revolucion, kies programo estis forigi la burĝan reĝimon, starigi kominisman ekonomion, k rekoni al la Iberiaj regionoj la rajton starigi sistemon laŭ la ĝenerala opinio de la laboristoj de ĉiu regiono, inter la marksimo aŭ la anarkismo.

La grandaj terposedantoj vidis en danĝero siajn proprecojn, la pastoroj timis pri la estonto de la religio jam konvertita en negoco; la militistoj sentis sin malaperi kiel superega kasto. Tiu ĉi faktoroj, unuiĝinte pro la rezulto de la Februara baloto, produktis la ribelon de Julio,

K kiam la 19an de Julio la faŝistaj militistoj leviĝis armile kontraŭ la reĝimo k la laborista klaso, Durruti estis malsana, ĵus operaciita pro du hernioj. Tamen li nemalfruiĝis alkuri en la vicojn de la antifaŝistaj batalantoj. En la Placo de Katalunio, en la Placo de Palacio, ĉe la pordoj de la soldatejo k en ĉiuj lokoj, kie okazis batalo, Durruti inspiradis la laboristojn kun fusilo en la mano.

La homo, kiu tiom da fojoj predikis la revolucion, kiam venis la vera momento okupis sian postenon en la batalo, malgraŭ ke lia farto ne permesis al li realigi fizikan forton. La entuziasmo, kiun li enmetis en la batala, lin kuracis. La sablado de la kugloj, la eksplado de la bomboj, la tamburado de la maŝinpafiloj, la bruego de la kanono k la flamoj de la incendioj pligrandigis liajn fortojn, ili kuracis lin tute, k en la plej bruaj lokoj Durruti ĉiam estis videbla.

En la loko, kie oni batalis plej intense, estis en la

apudoj de la soldatejo Atarazanas. Dum pli ol 20 horoj daŭris la batalo. La ribelintoj rezistis senespere en la soldatejo. Durruti, Ascaso, k García Oliver estis kune. Frumatene 20 de Julio la kugloj de maŝinpafilo disfendis la kranion de kamarado Ascaso, k Durruti estis vundita en la brusto k en la frunto.

Oni vidis Durruti-n ploranta antaŭ la kadavro de Ascaso. La larmoj ne ekaperis pro senpovo, sed pro doloro k koleriĝo.

En la burĝaj medioj Durruti estis konata kiel teroristo k murdisto. Durruti iris al la domo de la episkolpo de Barcelono. Durruti savis la vivon de la episkopo, kovrante lin per kovrilo por ke povu pasi neavertite inter la amasoj, kiuj postulis lian kapon. Ĉiujn objektojn de la episkopa domo, kiuj valoris milionojn da pesetoj, Durruti transdonis al la Ĝeneralitato de Katalunio.

Post la sufokigo de la ribelo en Barcelono, oni ekkonis, ke la faŝistaj fortoj de Zaragozo antaŭeniradas al Katalunio. Por 24 horoj Durruti organizis kolonon de 12.000 homoj k ekiris tuj al Aragono por bati la faŝistojn.

La kolonon de Durruti oni nomis la kolono de la venko. Ĝiaj homoj estis el la plej kuraĝaj k bravaj. Prefere morti el retroiri, estis ties signalo. Li donis al siaj homoj moralon k disciplinon volonte akceptitaj. Tiun, kiu post promeso batali gis morto, senkuraĝiĝis, aŭ forlasis iun pozicion, li destinis fosi tranĉeojn. Al tiu, kiu deciĉis sin senmoraligi la milicanojn, li forprenis la sindikatan karton k rehejmigis lin. Durruti pasigis ĉe la fronto 4 monatojn. Durruti ne estis vantema nek aŭtoritatema. Por siaj homoj li estis kamarado. La efiko kun kia batalis lia kolono radikis en la kamaradeco k la ekzemplo de Durruti. Kontraste al la starigita normo en ĉiuj armeoj, Durruti ne direktadis la bataloperaciojn de ĝenerala stabo, sed de la tranĉeoj mem, estante ĉiam en senpera kontakto kun la milicanoj. La ekzemplo inspiras ĉiam konfidon. La militteknikistoj konsilis Durruti-n malproksimiĝi de la danĝero pli posten. Sed li faris la revolucion k ne la militon, ĉiam kunestis kun la kamaradoj en la tranĉeoj. Li ne estis leŭtenanto, nek generalo. Milicano kiel la ceteraj. La milicanoj de lia kolono post la morto de Durruti diradis: "Durruti ne komandadis, li edukadis. Pro tio ni obeadis al li k estis disciplinitaj."

**La morto de Durruti.** — Kiam la faŝistoj invadis Irun-on, San Sebastian-on k Toledon, ili entreprenis decidan ofensivon kontraŭ Madrido. La krimuloj Franco, Mola, Queipo de Llano k la aliaj satrapoj bezonis konkeri Madridon por esti agnoskitaj de la internacia politiko. Italio k Germanio jam estis rekonintaj la registaron de Franko. Se ili prenas Madridon, estis tre kredeble, ke la registaroj de la ceteraj landoj konsideros venkita la demokration k lasos la manojn de la internacia faŝismo liberaj por povi manovri en Hispanio.

La luitaj hordoj de Franko venis antaŭ la pordoj mem de Madrido. Ili estis jam enpenetrantaj. La faŝista gazetaro jam estis ektrumpetanta pri la eniro de la "Naciistoj" en Madrido. Tiam oni ekpensis pri Durruti. Nur li kun sia kolono ja povas savi ĝin. Nur la ŝturmo de la kolono de Durruti povas rompi la ferringon, per kiu la faŝistoj zonis la ĉefurbon. Durruti hezitis iom k poste decidis. Li kunvenigis siajn homojn k ili kunsentis iri al Madrido. Kiam la kolono de Durruti alvenis per aŭtomobiloj al Madrido, la hordoj de Franko jam enpenetris la periferion de la urbo k pretendis daŭrigi pluen. La homoj de Durruti descendis de la aŭtomobiloj k tuj jetis sin al la batalo. Ekkomenĉiĝis nekomparebla luktado, korpo al korpo. Tri tagojn k tri noktojn ili luktadis senĉese. Per la korpoj ili elpuŝis la hordojn de Franko al la periferio, al la Universitata Urbo (Ciudad Universitaria).

Poste Durruti havis kun aliaj militistoj bruan kunvenon. Senkompromiseme li estis esprimita sian opinion super la organizado de la milicanaro. La fajra batalo estis daŭranta. Li estis revenanta al siaj homoj por kuraĝigi ilin. Sed ho ve! kuglo enboris lian korpon.

En la fajro de la batalo mortis la filo de la proletaro. Centoj k miloj da laboristoj k proletoj priploris lian morton. La laboristaj k kamparanaj amasoj ja estis perdintaj sian aŭdacan defendanton. La homo kun la giganda korpo k infana koro ne plu parolos al ili.

Mortis Durruti. Oni enterigis lian korpon. Dekoj da miloj da laboristoj ĉeestis lian enterigon. Sed lia liberecana spirito vivas inter ili. La idealaro de Durruti entuziasmigas ilin, k donas kuraĝon daŭrigi la batalon kontraŭ la tiranio k la reakcio.

La memoro pri Durruti ĉiamos inter la laboristaj k proletaj amasoj. Lia vivo ja estis multe pli utila ol tiu de Julio Cezaro, la perversa militisto k incendiginto de la brilegaj bibliotekoj de Pompeya, Ateno k Romo, multe pli utila ol tiu de Neron teroristo k tirano, ol tiu de Filipe II, inkvizitoro k enkarceriginto de Servantes.

Lia samsortano Boteff kantis antaŭ 60 jaroj:

Ja kiu falos per la Libero
mortas neniam! Pro li ekploras
naturo, besto, nubo k tero,
k bardoj mira-kante lin gloras.

**Kompilis PARIO**

## KOMORERA KOMERCAS

*La Sekcio de la sapistoj el Industrio pri la Ĥemiaj Produktaĵoj aĉetis eksterlande por 1.000.000 pesetoj sodon kaustikan por fabriki sapon por la Barcelona loĝantaro. La aĉetprezo de la sodo estis 1'02 pesetoj por 1 kgr.*

*Kiam la ŝipo kun la kaŭstika sodo alvenis al la Barcelono, ĝi estis konfiskita de la Priekonomia Konsilantaro laŭ ordono de Komorera k post kelkaj tagoj estis donita al burĝoj, intimaj amikoj de Komorera, por ke ili vendu ĝin je 8'50 pesetoj unu kgr.*

*K tio okazas dum la tuta Barcelono suferas pro manko de sapo k dum eksterlande oni kolektas sapon por ni.*

*Bona defendanto de la popolaj interesoj!*

### NEKROLOGO

Du esperantistaj kamaradoj, batalantojpor libero k justa socio estis trafitaj de malamika kuglo.

K-doj Enrique Olmedo k Lateltin.

K-do Olmedo estis neforgesebla amiko k bona esperantisto.

K-do Lateltin estis eks-sekretario de F. E. T. —grupo en Levallois— Perret (apude de Parizo) k membro de F. E . T.-komitato.

Ĉiaman memoron al la heroaj antifaŝistaj batalintoj!

# NIA HISTORIO ESTAS LA EPOPEO DE LA HISPANA PROLETARO EN LA LUKTADO POR SIA LIBERO

Efektive ni estas ĉiam samaj. Ni la anoj de C. N. T. k F. A. I. ŝanĝis nek nian konduton, nek nian karakteron, nek niajn idealojn. Ni estas ĉiam samaj.

K kio estis ĉiam la anoj de C. N. T. k F. A. I.? Ŝturmanoj kontraŭ la reakcio k la subpremanta kapitalismo. Grandanimaj al la batalo en la defendo de la laborista klaso, ili neniam konis la interpacon, aranĝadon, nek senkuraĝiĝon. Se la venko donadis al ili forton por sekvi antaŭen, la malfeliĉo neniam atingis klinigi al ili la kapojn, nek igi ilin deponi la batalilojn. Ties batalema spirito antaŭe k poste la 14 de Aprilo 1931, kiel same antaŭe k poste 19 de Julio 1936, brilas kiel plej bona atesto diktata de la unika tribunalo—la popolo.

## ANTAŬE 14 DE APRILO 1931

La historio de la hispana liberecana movado estas seninterrompa sinsekvado de bataloj por la integra liberigo de la produktistaj amasoj. Ĝi estis ĝia unika prozelita propagando. Sian apogon k sian solidon ĝi trovas en tiu ĉi esenca eco. Estas aŭtenta k efectiva movado, ne teorio aŭ doktrino ellaboritaj artefarite k kiuj bezonas difinantojn. La teorio estas la agado, la doktrino—krei. La malsatantoj, la bezonantoj, la mizeruloj, la humilaj, la persekutataj de la maljusto, la senrajtigitoj kunigas siajn korojn, siajn volojn k siajn brakojn k formas mirindan armeon por alfrontiĝi la arbitran k despotecan socion. K kun la lasta ili ne paktas, nek akceptas ĝiajn donacojn, nek aŭdas ĝiajn konsilojn. Tiu socio estas ilia malamiko k ili ne pensas pli ol detrui ĝin por krei alian, kie la Laboro estu la unika potenco respektinda, k la Libero unika diaĵo adorinda.

La registararo de la borbona Monarkio ne havis malamikojn pli timigajn k malamajn ol la batalantojn de la anarkosindikalismo. Ĝi povis superregi k reteni kelkajn alfluitajn laboristojn. Sed malgrau siaj persekutoj k kruelecoj ĝi ne povis redukti la anarojn de C. N. T. Nek la enkarcerigoj, nek la enkatenigoj, nek la "leĝo pri fuĝ", nek la "Liberaj Sindikatoj", kiuj estis partio de murdistoj protektataj de la Povo por ĉasi surstrate la liberecanojn, digis al C. N. T. k F. A. I. disvolvi siajn aktivecojn. Kiel dum tempo de sekreto, tiel same dum sia lojaleco la anarkosindikalismo imponis sin etendiĝi tra la tuta Hispanio. La supermezura forto ekspansia de la movado ne stagnis, sed multiplikis sian konstruadan kapablon. Do kiam la borbona Monarkio venis al sia finiĝo, C. N. T. k F. A. I., spite al ĉiuj persekutoj, al kiuj estis viktimoj, aperis kiel blokoj kun singulara forto.

Falis "lideres", malaperis admirindaj kamaradoj, sed la organizo estis pli kompakta, pli homogena k pli forta de tago al tago. Ĉar en ĝi la individuoj ne kalkuliĝis. Kio valoras, estas ties spirito, ties taktiko, ties idealo. La individuoj anstataŭas la aliajn. Sed la virtoj pluas, ĉar korespondas al la amasoj.

Ekster la luktado kontraŭ la ekspluatanta klaso la liberecana movado neniam marĉandis sian konkurson al fremda iniciativo. Por enabismigi la politikan reĝimon. Ĝia sendependo, ĝia nepolitikeco neniam estis obstaklo por disponigi sian kunlaboron audacan k decidigan. Ne estas ekago, en kiu ne estas reprezentitaj la liberecanoj. Eble aliaj sektoroj montriĝis senkuraĝaj en iuj kazoj, sed nek C. N. T., nek F. A. I. ne alkuris al la alvokoj, kvankam ne estis kiuj ilin direktis. Ili ja estis fortoj eminente revoluciaj. Ili ja ne havis alian substantivan impulson, ol la revolucion. Ĉu ili ne faris ĝin ĉiutage kun nelacigebla persistado, kun nefleksebla obstino, ne konsiderante la izoligon sen timo antaŭ la premadoj, kiuj super ili abundis?

## POSTE 14 DE APRILO 1931

Ĉe la alveno de la Respubliko ne ĉesis la batalemo de nia Organizo. Ĝi vidis klare, ke la reakcia besto ne estis mortinta k kaŝobservadis la okazon por faligi sin sur la popolo kiel tigro sur sia viktimo. Blindaj estis la politikaj partioj, kiuj fariĝis rektoroj de la nova reĝimo. Tiom blindaj, ke lasis al la dekstrularo refortiĝi, marĉandi la sociajn progresojn, kiujn volis la popolo k preparis sin por uzurpi la povon.

C. N. T. ne sentis sin solidara al la erara afero, kiun entreprenis la Respubliko k sekvis fidela al sia revolucia normo por atingi la konkerotajojn de la laborista klaso. K la politikaj partioj alfrontis la popolon k la emancipiĝon de la laborista klaso, uzante ĉiujn rimedojn tiacelajn. Plurfoje niaj kamaradoj devis leviĝi k ne trovante la apogon de la fratoj de la liberecanaj idealoj, vidis sin solaj k estis pereigitaj de la fortoj de la ŝtato.

## POSTE 19 DE JULIO 1936

La respublikana halucinacio ebligis la militistan ribelon, kiun iniciatis k financis la reakciaj fortoj, vidante kiel eliĝas el ties manoj la rimedoj, per kiuj ili sklavigadis la popolon, k la liberecanaj batalantoj ekde la komenco mem ĵetis sin al la luktado. Ili forgesis malestimon k persekutojn. Ili ne vidis alion ol la nigran beston, kiu denove pretendis levi siajn ungegojn por enigi ilin en la karnon de la proletaro. En Barcelono ili faligis sin kiel trombo sur la kanonojn, per kiuj pafadis la perfidulo Goded k premis la ribelon. K de tie ili eliris ĉekape de Durruti por reokupi la Aragonan regionon, kiun ekposedis Kabanjellas post sanga murdado de niaj kamaradoj. En Madrido estis la unuaj, kiuj eniris la soldatejon **"Montanja"**, en **Kampamento**, en **Vikalvaro**, en **Kuatro Vientos**, en **Karabanĉel.** Oni ne donis al ili armilojn. Ili havigis al sia tiajn, forprenante tiujn de la malamiko. K poste tiuj glorplenaj tagoj, la konkero de Guadalajara k Toledo. Neforgeseblaj tagoj de ekzempla heroeco. La batalionoj de C.N.T. formiĝis senĉese k alkuris ĉien, kie la danĝero estis pli granda. La ardo anstataŭis la teknikon. K kiam la materiala avantaĝo de la malamiko imponiĝis, la milicoj de C. N. T. ne forlasis la luktadon pro tio. Ties historio de batalantoj, ties fera memdisciplino, ties sperteco streĉis al ili la muskolojn k vigligis al ili la volon. Al batalo ĝis morti aŭ venki! Tia estis ĉiam la signalo. K ĝi pluas. Huelva falis en la povo de la maŭroj k la legionanoj, kiujn komandis Yagüe. La provinco estis en la povo de la faŝistoj. Sed tien venis niaj kamaradoj farante de ĉiu roko bastionon k de ĉiu konkavo—kaŝejon.

En Bilbao estis niaj kamaradoj. kiuj ne foriris k renkontis per pafado la invadintojn k estas niaj kamaradoj la unuaj fusilmortigitoj. Pli ol 500 kamaradoj falis traboritaj de la kugloj de la servistoj de la faŝismo. Okazas la falo de Santander. La francaj ĵurnaloj raportas, ke la unikaj trupoj, kiuj ankoraŭ ne kapitulacis, estis du batalionoj de C. N. T. La korespondanto

Kion signifas ni?

C. N. T. estas en Hispanio la organizaĵo antaŭ kiu forŝvenis la tiranoj. Ĝi estis la determinanto pri la alveno de la Respubliko k pri la balota triumfo de 16 de Februaro. Ĝi fordronigis en senprestiĝon tiujn, kiuj ĝin persekutis k volis ĝin neniigi. En ĉiuj etapoj frakasis la registaroj, kiuj volis iri kontraŭ ĝi. Ĉiuj forfalis k C. N. T. reaperis potenca, surpuŝante, tiujn, kiuj revis pri ĝia neniigo.

Ni reprezentas plejan kvanton da interesoj ol kiu -ajn organizo k partio. La interesojn de miloj da batalantoj, kiuj luktadas en la tranĉeoj ne pro kaprico doni sian vivon, sed por la libero k la emancipiĝo, kiun portas la venko super la subpremantaj klasoj.

Ni reprezentas la defendon de centoj, de miloj da aliĝintoj, kies interesoj, pro tio ke estas ĝuste proletaj estas plej sanktaj ol nenio alia. K ni korpigas popularan senton psikologian de la hispana popolo.

**Gravaj horoj.**

Post ĉi tiuj antaŭdiroj ni rajtas paroli laŭte k aŭdace.

Ni travivas la plej gravajn momentojn, kiuj okazis ek de 19 de Julio 1936. La jusa perdo de Austrio kreas al ni situacion malfacilegan. La demokratioj plu balbutas iujn vortojn, kiuj notas decidojn firmajn, sed de te ne plu transiras. La internacia faŝismo anstataŭ tio plu sendas kontigentojn por nin bati k premi. La popolo sentas sin trompita. La moralo de la venko, kiu antaŭis la popolajn batalojn de 19 de Julio aliĝas en moralon de frakaso, sekve de multe da detaloj k faktoroj, kiuj reproduktiĝas ĉiutage k inter kiuj ne estas la malpli gravaj rigardi la karcerojn plenaj de antifaŝistaj arestitoj, kiuj la 19 an de Julio k poste elmetis sian vivon pro la defendo de la libero k pridubi la efikon pri la direktado politika k milita.

Konstante oni parolis k plu parolas ĉiuj pri agado unueca. La koreco estus atinginta la plej altajn limojn, se la vortoj estus kalibrintaj la plenumadon, sed estas certo, ke la malunueco prezidas niajn aktojn. Ĉiuj k ĉiu pensas altiri la popolon al sia organizo k partio. Oni ne realigas aktojn, kiuj ne havas prozelitismon, banditadon k absorbadon.

Ni ne povas sekvi ĉiu tiun vojon! Jam estas horo puŝi nin k streĉigi la ligilojn de la unueco ne per vortoj, sed per faktoj praktike realigitaj k noble plenumitaj.

Ni faras alvokon al konkordo. Ni eligas krion, batalsignalon klaran k finan de antifaŝistoj al interkompreniĝo, al laboro, al respondeco k realigo de la afero! La unueco de la agado inter ĉiuj partioj k organizoj, kiuj formas la antifaŝistan blokon, ne plu devas esti babilado sed transformiĝi en realon. La lojaleco de ĉiu ne povas esti mito. La stariĝo de la egaleco de la rajtoj k la devoj por ĉiuj devas esti ekde hodiaŭ faro netuŝebla, ne vundebla. Ekde ĉi momento estas necese, ke ni devas fari reciprokajn cedojn kunajn k kiuj ilin vundebligas, devas esti taksataj kiel malamikoj de la antifaŝisma afero k kunlborantoj de tiuj, kiujn ni havas transe de niaj tranĉeoj.

En la terura lukto, kiun ni subtenas, ni ĉiuj estas bezonaj. Ne estas influo, kiom ajn eta estú, ne estas forto, kiom ajn reduktita estŭ, kiu ne estas utila k bezona por la celata afero. Ni ĉiuj estas bezonaj. Ĉiuj do unuiĝintaj, povos sekurigi la eblojn de la venko. Splititaj, sekvante la vojon, kiun ni jam 15 monatojn marŝas, nur la frakaso nin atendas. C. N. T. ne volas fariĝi respondeca pri tiu frakaso. La popolaj amasoj, kies interesojn ni reprezentas, ne estas konsentaj, sekvi tian vojon. Ili volas venki! Pro tio ni volas, ke ĉiuj akceptu k plenumu efektive k rapide ĉi batalsignon de agado unueca inter ĉiuj partioj k organizoj, kiuj formas la antifaŝistan blokon.

Ekde ĉi momento kiu retenas sin de ĉi batalsigno, kiu pretendas daŭrigi siajn atakojn kontraŭ organizajoj, partioj aŭ antifaŝistaj individuoj, kiu kontraŭos al la starigo de komunaj cedoj k kuna agado disvolvata kun egaleco de la rajtoj k la devoj, estos venkita, ĉar la dilemo devigas, ke la aĵoj estu situataj laŭ tia tranĉanta plano. Aŭ ni venkos aŭ pereos! Meditu ĉiu k faru kio estas farenda! Kunlaborantoj lojalaj aŭ malkaŝaj malamikoj! Unueco aŭ malunueco!

C. N. T. vokas al kunlaborado k unueca agado praktika! La 21an de Okobro 1937. La Nacia **KOMITATO**

# LA KULTURA LABORO EN LA FRONTO

Se oni ekzamenas atente la hispanajn aktualaĵojn, tuj rimarkos, ke la plej vindinda fakto estas la vekiĝo ĉe la laborista klaso de granda sciemo. Tio ne nur estas la dezirego koni la sociajn ideojn por trovi per ili la solvon de la multnombraj problemoj, kiujn estigas la Revolucio. Estas ankaŭ la avido al scio, nur pro la nura ĝojo scii, lerni por plialtigi sian kulturnivelon, kio igas la laboristojn de la revolucia Hispanio malfermi multajn lernejojn por instrui ĉiujn infanojn, krei novajn institutojn k superajn lernejojn por laboristoj; elĉerpi lernolibrojn k kulturajn revuojn el la librovendejoj k organizi elementajn klasojn en la fabrikoj k vilaĝetoj por laboristoj k kamparanoj analfabetaj.

Kie plej klare oni rimarks tiun avidon al kulturo estas ĉe la batalfrontoj. Ĉe ili oni organizas klasojn eĉ ĉe la unuaj parapetoj. Ĉiu militkompanio, en kiu estas 100 batalantoj proksimume, havas instruanton. La lasta preskaŭ ĉiam estas iu kapabla kamarado, kiu bonvole sen rifuzi siajn militdevojn, instruas la alfabeton al la laboristoj k la kamparanoj nunaj batalantoj, ĵetitaj en plej granda malklereco de la kruela k maljusta kapitalisma sistemo, kiu nin subpremadis ĝis la 19 de Julio 1936.

Estas ĝojige k entuziasmige vidi kiel 35-40 jaraj viroj senkleraj akceptas lecionojn de 18 jaraĝaj junuloj...

En ĉiuj vilaĝoj apudaj de la batalfrontoj ekzistas "hejmoj de la batalantoj", kie troviĝas Biblioteko kun pluraj libroj k kie dum la ripostagoj oni daŭrigas la kursojn komencitajn en la parapetoj.

Niaj batalantoj ne pensas profiti la libertempon en frenezaj distroj pro tio ke en iu batalo estas perdebla la vivo. Ne, kamaradoj! Ili nur pripensas, ke la venko super la faŝismo k la socia rekonstruo ne eblas, se la popolamaso ne posedas elementan kulturon. Tial la batalantoj ĉe la fronto ĉeestas la elementajn kursojn. Ili obstine aspiras forigi el siaj mensoj la malklerecon. Pro tio oni kreas multnombrajn "Institutojn por Laboristoj", el kiuj eliros la instruistoj, la kuracistoj k la inĝenieroj, kiuj linios la planon de la nova Hispanio, kultura k grandioza, por starigi ĝin en la avangardo de la Civilizo...

Kiu povos venki tiun energian popolon, kia estas la hispania, kiu dum kruela batalado kreas tiel potencan movadon?...

J. G. MAYO

fronto de Guadalajara

# KONSCIA LUKTADO KONTRAŬ LA FAŜISMO

*Post la unua letero de k-do Bas Welsh kiun (leteron) ni aperigis siatempe k kiu estis tradukita en plurajn nacilingvojn i. a. hispanen, katalunen, francen, bulgaren, japanen k represita de certaj antifaŝistaj gazetoj, nin ĝojige trafis alia. Kun la sama plezurego ni presigas la duan leteron de k-do Bas Wels, la honesta k nesubaĉetebla batalanto por socia justo k liberigo de la laboristaro tutmonda el la ungegoj de la faŝismo.*

Kamaradoj, tutregule mi ricevas la "In. Bul." -ojn, samkiel multaj aliaj kamaradoj en nia urbo k en nia lando. Kun ĝojo mi konstatas, ke "Informa Bulterno" nuntempe pli vaste estas legata ol antaŭe k mi opinias, ke la SAT- kongreso estas unu el la kaŭzoj, ke nun la laboristoj ĉe ni pli fervore pristudas la gravajn problemojn, kiujn la antifaŝisma luktado neeviteble altrudas al ni. Mi kompreneble celas la esperantistajn proletojn, kiuj en Nederlando **relative** abundas. Ĉiuokaze oni nun estas pli pensema, oni nun pli scias pri via Bulteno, oni nun pli funde sekvas la iradon de la okazaĵoj, kiuj por ni estas sufiĉe komplikitaj. Vi ja komprenas, ke ankaŭ ĉe ni multaj laboristoj, kiuj pretas kontraŭbatali la faŝismon, ne estas sufiĉe konsciaj, ne sufiĉe politike kompetentaj por juĝi pri tio, kion la proletaro devas fari por havi ŝancon plene liberiĝi el la jugo de la malamika klaso ĝenerale. Ili ja ankaŭ ne komprenas, ke la internacia diplomatio altrudas sin al la batalo en via lando k ke tiu diplomatio penadas uzi la hispanajn proletojn por siaj celadoj. Estas tiel ke oni diverskaŭze povas estis kontraŭa al la faŝismo. La proletaj amasoj pro manko de sufiĉa intereso k pro manko de kompetento ne komprenas, ke oni povas luktadi kontraŭ la faŝismaj bandoj en plena servo de potencoj k fortoj, kun kiuj la klaskonscia proletaro havas nenion komunan. Ĉe multaj samklasanoj de ni la malamo al la faŝismo estas ardega, sed tiu malamo ofte faras ilin la ebeaj servistoj de la ruzaj diplomatoj, tiom pli kiam tiuj ruzaj diplomatoj estas samtempe "ruĝaj". Ne estas ĥimero aserti, ke la proksima milito estos realigata per la devizo "Kontraŭ la faŝismo" k ke la proletaro furioze murdados unu la alian, opiniante, ke ĝi agadas pro sia libero.

Fakto kompremeble estas, ke la proletaro kiel ĉiam oferegas por malamika klaso, por la friponoj, kiuj regas la mondon k kiuj konsideras nin kiel materialon necesan por iliaj krimaj agadoj. **Estas nia taskego transformi la nunan nebulan malamon kontraŭ la faŝismo en konscian luktadon kontraŭ tiu ordo, kiu kreis tiun faŝismon k estonte ĉiam kreos tiajn reakciajn bandojn, kiuj minacas la homaron per teruregaj militoj k minacas la proletaron rilate vivon, vivkondiĉojn k spiritajn liberojn.** Ĉar nur la konscia agado kontraŭ la ordo, kiel regas la malnoviĝanta patriotismo, kaŭzanto de militoj, kies teruregajoj ni nun ne plu povas imagi al ni, kie malsategas homoj pro manko de mono, kiu vane kuŝas en la bankoj dum nutraĵoj esta forĵetataj aŭ malmultigataj por altigi la prezojn, mi ree diras, nur la konscia agado kontraŭ tiu ordo estas la nura rimedo, per kiu ni por ĉiam povas liberigi nin de la reakciaj bandoj nunnomitaj faŝismo.

Tial la klaskonsciaj proletaj en nia lando ĝojas, ke la kamaradoj, kiuj prizorgas la eldonon de "Informa Bulteno", jam pruvis, ke ili komprenas sian taskegon k neniam inklinas malligi la batalon por nova ordado de la luktado kontraŭ la bandoj de Franko. Ni ĝojas, ke vi klare konscias, ke aliaj Frankoj embuskas.

Tial tiuj klaskonsciaj proletoj ĉe ni gratulas vin pro via laboro, gratulas vin, ke vi praktikas nian lingvon Esperanto por iu sankta celo: Frakasi la multkapan faŝismon **por ĉiam** k eduki la subprematan klason, por ke ĉi tiu komprenu sian grandegan mision. Kalkulu je nia helpo, je nia subteno, kiu je nia bedaŭro ne povas esti tial granda, kiel ni deziras. Tamen ni defendas vian aferon, senmaskigas etburĝajn eldonaĵojn, kiuj prezentas sin kiel proletajn k kiuj klopodas diskredetigi vin ĉe la tutmonda proletaro.

Ke vi trovu forton daŭrigi la batalon kontraŭ oceano de maljusto, malsaĝo k senkaraktereco!!

Frate via.

**BAS WELS**

# GRAJNAĴOJ

### LA FERO DE SVEDIO POR LA REARMADO DE HITLER

Statistikoj el Stokholmo reliefe montras pliiĝon en la eksporto de la sveda mineralo. Dum Julio estis eksportitaj 1.385.000 tunoj da mineralo. Estas rekordo. Sed laŭ datoj faritaj dum Aŭgusto tiu nombro estas superita dum la lasta monato nur la eksporto de la firmo Grangesberg atingas la kvanton 1.231.000 tunoj, konsiderante, ke dum la sama monato pasintjare la sama firmo eksportis 751.000. Oni devas noti, ke tiu firmo ekspluatas la 90 procentojn de la lapaj minejoj.

Kien veturas tiu moneralo? Pleje al la ferindustriaj centroj de Germanio. Ĉi tiu lando, fakte en preparo de siaj aŭtarkiaj ambicioj, alpropriĝas al si ĉiun mineralkvanton, kiun ĝi povas pagi. Ĝi serĉas rezervojn k nutras la industriojn, kiuj arde laboras por la rearmado.

Jen ĉitie kelkaj elokventaj ciferoj:

El la 1.385.000 tunoj eksportitaj dum Julio 808.000 estis destinataj al Germanio k nur 182.000 al Anglio, kiu alcelas ankaŭ la realigon de ĝia prirearmada plano.

Svedio estas la ĉefa provizanto de Germanio rilate la fermineralon. Tio estas konstatebla el la sekvanta statistiko al jusaj mezdatoj k kiuj montras la diversajn procentojn de la germana fer-importo.

| | |
|---|---|
| Svedio … … … … … … … … | 42 % |
| Francio … … … … … … … | 33 % |
| Hispanio … … … … … … … | 7 % |
| Aliaj landoj… … … … … … | 18 % |

Evidentiĝas do, ke la minejoj de Francio k Svedio estas kiuj plej aktive partoprenas la nutradon de la germana peza industrio.

Kiel preterlasi la paradokson, ke estas lando regata do socialistaj, k alia kiu estas sub la gvida influo de la Popola Fronto, tiuj kiuj liveras al la Rejnvestfalia pezindustrio la mineralon, kiu estas transformata en detruilojn.

Francio siaflanke limigas la provizon al Germanio de sia fermineralo. Ĉu Svedio provas fari la samon? Ĉu oni povas peti al ĝi rifuzi sian kreditan komercan interligon koncerne al Germanio?

La ideologioj valoras neniom, kiam temas pri la ekonomia aktiveco. La ligno, la paperpasto, la papero k la kartono estas vendataj grave, sed nenio povas kompensi

la konsiderindan vendadon de la lapa vendado. Ĝi havas unuarangan rolon en la sveda eksporto. K Germanio staras en la ĝenerala komerco de tiu lando duavice post Anglio. Tio pli elokventas ol ajna komento.

Sovetio ankaŭ etendas sian rigardon al tiu loko ne por aĉeti mineralon, kiu ne mankas al ĝi, sed por pristudi la rimedon malebligi la germanan provizadon en kazo de milito.

### 20 JAROJ PERDITAJ POR LA PROLETA REVOLUCIO

Grandskale evidentiĝas la fenomeno de 1914 jaro. Antaŭ la monda milito, kiu flamis ekde la Sarajeva incidento, ĉiuj socialistaj partioj aliĝintaj al la II Internacio estis devigitaj starigi la problemon pri sia sinteno koncerne la burĝaron k la ŝtaton k la bezonojn de nacia defendo. Dum iuj partioj aŭ grupoj rezoluciis pri absoluta abstinenco k rifuzis voĉdoni por la militkreditoj, la ceteraj, la plejmulto komplete identiĝis kun la registaraj politikoj k kun la staboj, pretekstante, ke la pacifismo estas krimo, kiam la teritorio estas atakata.

Ankoraŭfoje la fantomo de la kolektiva murdado svarmas tra la. Universo. Ĉiuj ŝtatoj volas arm-armiĝi. K postulas en la nomo de la "minacata patrio" la konsenton k la senliman kontribuon de la laborista klaso. Kion fari?

Kiel en 1914 la proletaro k ĝiaj partioj statas sen orientiĝo. En Francio la laboristaj organizoj kontraŭstaras sekvi la armigadajn planojn de la burĝaro. En Anglio kontraste, la Tred-Unioj entuziasme voĉdonas favore al la militkreditoj. Francio k Anglio statas antaŭ la sama danĝero: la proksima atako de Italio, Germanio k Japanio. La proletoj de Francio opinias, ke ili ne devas aliĝi al la naciismo k al la imperialismo de sia ŝtato. La anglaj laboristoj pensas, ke ili ne povas ne voli militon kontraŭ la faŝistaj landoj. En la medio k en la cirkonstancoj, en kiuj troviĝas la unuj k la aliaj, ambaŭ pravas. La dilemo estas angora: ĉu aliĝi ankoraŭfoje al sia ekspluatanta klaso; ĉu doni liberan vojon al la krima faŝismo.

La dilemo estas angora, ĉar la proletaro ne decidis ĝustatempe pri propra solvo de siaj problemoj, pri propra politiko. Se dum la pasintaj 20 jaroj ekde 1918 la internacia proletaro estus antaŭforiginta la danĝeron de futura milito, kontraŭstarante la faŝismon, la rearmigonk la imperialistajn manovrojn, hodiaŭ ne ekzistus milita danĝero. Tion ĝi ne faris, k hodiaŭ al ĝi prezentiĝas problemoj preskaŭ nesolveblaj laŭ klasa vidpunkto. K la kerno estas, ke ne estas savo rilate al la laborista klaso, se tiu ne estas realigata sur revolucia tereno, rompante ĉian ligilon de la burĝa ŝtato k la kapitalismo. **Tradukis: OSBANTO**

***MALANTAŬEN AL LA MEZEPOKO!***

*La 28 de Oktobro la ministro pri la Interna Afero sinjoro Zugazagoitia prononcis diskurson, el kiu ni ekstraktas la jenan perlon:*

*"Ĉiuj devas obei silente. K ni venis por rememorigi al vi, sen doni konsilon, la sagacan formulon de tiu escepta kapitano de la milicanoj de Kristo, kiu nomiĝis Loyola, kiu por ambicii grandajn venkojn k konigi kiel estas atingeblaj imponis al siaj partianoj silentan obeemon (perinde ac cadaver).*

*Tian silenton bezonas la venko. Obeemo ĝistomba k ĝismorta."*

*SVEDA KUNLABORO*

## LA HISPANA HELPKOMITATO DE SODERTALJE

La 27an de Novembro 1936 fondiĝis la Hispana Helpkomitato de Sôdertâlje, al kiu elektiĝis reprezentantoj el 8 diversaj organizoj. La unuaj faroj de la organizo estis per oportuna propagando sciigi al la enloĝantaro la verajn cirkonstancojn en Hispanio.

Inter alie ni disdonis 15.000 flugfoliojn, fiksis afiŝojn en ĉiuj centraj lokoj, aranĝis publikajn paroladojn, montris filmon ktp.

La 8an de Novembro komenciĝis la mon-k vestajpetado. Cento da junuloj, provizitaj per monkolektujoj k legitimaciiloj, k bone konsciantaj pri la graveco de la afero, komencis cirkaŭi la geurbanojn. La rezulto ne forestis. Multe da monok vestaĵo estis la rekompenco pro la klopodo.

Bonan helpon ricevis la Komitato, kiam la duonfaŝistaj gazetoj ekkomencis diskuti nian laboron. Al ilia ĉagreno la fi-skribado efikis tutmale.

La 21an de januaro 1937 fondiĝis Virina Komitato, kiu estis komisiita viziti ĉiujn komercistojn, petante helpon. Montriĝis, ke ankaŭ ili estas tre komprenemaj k ofervolaj por la afero.

La sama Virinkomitato prenis sur sin la taskon kudri vestaĵojn por la hispanaj infanoj. Post-duonmonata laboro la virinoj montris antaŭ la publiko 200 kgr. da tute novaj vestaĵoj, kiujn pere de la Sveda Helpkomitato por Hispanio kun saluto en Esperanto sendis al la hispanaj kamaradoj.

Du mon-donacoj de la Landa Ĉeforganizo kune 100.000 estas postula propono de la laboristaro de Sôdertâlje.

La ĉi-jara manifestacio de Ia de Majo okazis laŭ la propono de la komitato unueca kun la signalvorto **Por la liberbatalanta hispana popolo!**

La 16an de Junio la Komitato aranĝis manifestacion pro la 1jara datreveno de la hispana lukto. Ni kunveniĝis la laboristojn tuj kiam finiĝis ilia labortago. Kun muziko k standardoj ili marŝis de la pluraj fabrikoj tra la urbo al la Popola Domo, kie paroladis la gvidanto por la Hispana Helpo en Svedio Georg Branting.

Do Sôdertâlje, malgranda urbo, situata 36 km. de Stokholmo, inter siaj iom pli ol 14.000 enloĝantoj ĝis nun kolektis 500 kgr. da vestaĵoj k 10.000 kr. Krome la laboristaro de Sôdertâlje garantias la vivtenadon por 32 infanoj ĉe la Sveda Infanhejmo en Breviere (Francio) al kiu ni pagas 760 kr. monate.

Nun la laboristaro de Sôdertâlje entreprenas la aranĝadon de grandioza ekspozicio antifaŝisma. Ni volas doni al ĝi kiel eble plej vastan popularecon. Tiucele ni elektis Ekspozician Komitaton, kiu prizorgu la havigadon de materialo k ekspoziciaĵoj.

Por garantii al la ekspozicio plejan sukceson ni alvokas pete la antifaŝistajn esperantistojn el ĉiuj landoj alsendi al ni diversajn ekspoziciaĵojn, aldononte klarigojn en Esperanto.

La laboristaro de Sôdertâlje esprimas al vi anticipan dankon pro la elmontrota helpo, salutante vin antifaŝiste!

Per Esperanto kontraŭ la faŝiismo!

**KARL AXELSSON**
**(por la Ekspozicia Komitato)**
Dalgatan 7 B., Sodertalje, Sved

# RAPORTO PRI I.P.E.-KONGRESO

Iom malfrue ni presas raporton pri la IPE-kongreso. La kamaradoj senkulpigu nin. Ne ni kulpas pri tio. La letero kun la raporto, devenanta el terorlando, por trafi nin, veturis 44 tagojn. Sed, kvankam iom malfrue, jen ĝin. -Red.

Estante en Roterdamo, mi vizitis ankaŭ Parizon. Dum tiu tempo IPE okazigis sian 3an kongreson. Mi, hazarde aŭ intence, ne gravas, partoprenis la kongresajn kunsidojn. Kiel gasto kun aliĝilo por 20 fr.fr., ĉar la kasisto, staranta ĉe la pordo, neniuokaze permesus al mi eniri, se mi ne estus paginta. Do estas grava la laboro de la kongreso, k mi sentas min devigata raporti en konciza formo pli speciale pri la "raporto" de la hispanaj delegitoj.

1e. En la kongreso regis "popolfronta atmosfero" k senkritika opinio.

2e. Aliĝis 130 esperantistoj el pli ol 10 landoj, sed la kunvenojn partoprenis ne pli ol 40-50 personoj. Pli grava konsisto estis: Anglio, Belgio, Nederlando, Hispanio k Francio.

3e. El la ĝeneralaj vortoj—ne estis detalaj raportoj—oni povas kompreni, ke la IPE-centro en Sovetio memlikvidiĝis. Tial ke la konstanta delegito el Sovetio Nekrasov aliĝis al IEL-Varsovio. Restis, ke oni kontrolu, ĉu vere Nekrasov partoprenis la kongreson de Varsovio.

4e. Soveta Esp. Unuiĝo? Ne estis delegito, nek ekzistas rilatoj kun tiu organizo ekde kiam la sinteno de Nekrasov estas malklara.

5e. Oni proponis, ke la nomo de la organo "Sur Posteno" estu ŝanĝita pro sia komunista deveno. Nune ja la tempo altrudis alian politikon ktp. Fine oni forlasis ĉi proponon.

6e. La organiza centro restas en Parizo.

Koncize ĉi tiuj estis la pritraktitaj punktoj. Pli detalan raporton k paroladojn faris la hispanaj delegitoj, ĉefe Hernandez, redaktoro de "Popola Fronto" k Bosk. La tria, aŭ kiel Hernández mem esprimiĝis, "grava persono" estis deputato el Kordobo, profesie arkitektisto. Sed bedaŭrinde la "grava persono" diris gravajn laŭdojn nur pri si mem.

Rimarkinda estis kiel bona esperantisto k oratoro Hernandez, kiu tamen uzis siajn kapablojn fripone.

Jen koncize lia raporto pri la hispanaj aferoj preskaŭ laŭvorte:

1e. En Hispanio la situacio ne estas tia, kia ĝin oni imagas al si eksterlande. La anarkistoj havas la influon. Sed ili estas tiaj fantaziuloj, ke estas plej konvena la komparo: kiom da anarkistoj, tiom da anarkismoj ekzistas en Hispanio.

2e. Li priskribis la organizojn C. N. T. k U. G. T., rimarkante ke C. N. T. ofte servis al U. G. T., kiu siaflanke absolute simpatiis la "Popolan Fronton" defendante ĝin fidele. Li aldonis, ke al C. N. T. influis anarkistaj elementoj, pro kio ĝia sinteno estas negativa en la plej gravaj okazoj.

3e. Li prikrisbis—k tre majstre—la "tutan" historion de "Popola Fronto". Ke ĝi konsistas el 6 partioj, k pli detale li raportis pri la komunista partio, kiu pro sia saĝeco k sia kapablo en la sociaj agadoj faris "grandegan" sukceson k ke ĝi jam ĝuas plenan fidon de la tuta popolo ktp.

4e. Li notis speciale pri la ĉeesto de la partio de Pestaña, kiel bona k inda ekzemplo. Sur la partio P. O. U. M. li jetis malpurajojn k kalumniojn.

5e. Poste li konigis detale la atakojn de la anarkistoj komence kontraŭ la "Popola Fronto" antaŭe la balotoj. Ke ili estas la nuraj malamikoj de la sama, kiu tiutempe gajnis la absolutan unuecon, ĉar la popolo akceptis ĝin vere, senkondiĉe eĉ.

6e. Fine li rakontis pri la faŝista ribelo, asertante, ke la popolo estis forta por doni, akcentante la popolan fronton, mortan baton al la perfidularo, k dank al tio oni sukcesis en Barcelono, Valencio, Madrido k. a.

Eĉ vorton li ne menciis pri la anarkistoj k ties meritoj tiutempaj. Li priskribis la ribelon k la luktojn, kiuj sekvis dum tri semajnoj, sed nenion aludis al la Popola Fronto k la tiama registaro. Anstataŭ tio, li atentigis, ke dum tiu tempo la anarkistoj elmontris sin kiel homoj de la kaoso. Post la trisemajna lukto kontraŭ la faŝismo ili eldonis eĉ, laŭ lia aserto, kompreneble, afiŝojn pri la organizado de la nedisciplino.

Li nomis ilin knaboj, ĉar ili batalis neserioze. Ili, ekz, batalis ĉe la fronto k iris manĝi hejme k denove revenis al la batallinio.

Tiu fia kamaradaĉo dum pli ol du horoj jetadis sur la anarkistojn kalumniojn.

Fine la kongresanaro dum duonhoro dankis al sinjoro Hernandez pro la "valoraj informoj" k pro la "justa senpartieca priskribo" de la hispana stato.

Poste sekvis la jenaj demandoj:

Belgio: Kial la hispana registaro transdonis infanojn al la katolikoj, kiuj turmentas ilin per siaj religiaj altrudo?

Respondis delegito el Anglio, konigante, ke la episkopoj intence deklaris sin favoraj al la infanoj por havi eblon influi al ties libera spirito.

Francio: Kial la registaro de Negrin ĉiam fariĝas pli dekstra?

Respondis Azoris, rimarkante, ke tio ne estas aktuala demando, ke tiajn malverdirojn semas la etburĝaro. Enmiksis Hernandez, dirante, ke nun, tutkontraŭe, Hispanio havas maldekstran registaron.

Svedio: Ĉu la hispania registaro sufiĉe bone zorgas pri la trockia danĝero?

Respondis Azorin pozitive.

Post tio denove prenis la parolon la dolĉeparolanta Hernandez k faris la jenan deklaron:

Li kiel redaktoro de "Popola Fronto" promesas senrezervan helpon al la IPE-organizaĵo. K krome la paĝoj de lia gazeto estas je ĝia dispono.

Pri SAT li deklaris: "Ni devas utiligi ĝin ekskluzive por nia celo. Ni devas apogi ĝin ĝis tia grado, ĝis kia ni elĉerpos utilon de tio. Ni havas kondiĉojn utiligi SAT-on por niaj popolfrontaj celoj".

"Sed memoru, serioze li atentigis, neniuokaze SAT devas ekscii pri niaj vortoj ĉi-tieaj: Tio estas intimaj paroloj, kiujn devas scii nur intimaj rondoj, sed ne SAT aŭ kiu ajn alia."

"Kompreneble, kompreneble"—konsentis k aplaŭdis lin la anaro, la "popolfrontanaro" k la "defendantaro de la lojaleco k laborista unueco".

La kongreso finiĝis per la unika bondeziro, ke venontjare oni salutu sin pro pli grandaj gajnoj por la "sankta" fronto. K ke la kongreso okazu en Barcelono.

Nu, gekamaradoj, mi faris laŭpove k laŭeble koncizan raporton pri la IPE-kongreso. K ĝi miaopinie po-

# KRONIKO

"Frente Rojo", organo de la komunista partio, skribis 18an de Oktobro: "La Popola Fronto" estas la organo de la antifaŝista unuiĝo de la popolo en la lukto kontraŭ la invadintoj k la faŝismo, la bazo de la registaro, k samtempe la instrumento, kiu servos al la registaro por realigi siajn ordonojn."

"Solidaridad Obrera" respondis: "La "organo de la antifaŝista unuiĝo de la popolo" ne povas esti konsistigata nur de politikaj partioj dum estas la sindikataj organizoj, k precipe C. N. T., la plej firmaj bazoj de la lukto kontraŭ la faŝismo."

* * *

K-dino Emas Goldman, la avino de la Revolucio, kiel oni nomas ŝin, vizitis Lerida-n. Antaŭ la loka gazeto ŝi faris i. a. la sekvantajn deklarojn: "Oni devas rekoni, ke la registaroj ne solidaras al la hispana popolo. La tolerata kunkulpo de la "No-interveno" estas la plej elokventa pruvo pri tio. Oni timas la triumfon de la Respubliko, t. e. la triumfo de la laborista klaso enkadrigita en la du grandaj sindikataj organizoj C. N. T. k U. G. T., kiuj laŭ sia esenco tiel malmulte similas al la reformemaj organizoj de la aliaj landoj."

* * *

En Barcelono ekaperas novaj liberecanaj gazetoj "Mexico" k "Juventud Libre".

* * *

La Kataluna Federacio de la Liberecanaj Studentoj (F. E. C. L.) komencis la eldonon de sia revuo "Evolucion". Ĝi estas riĉega de ideoj. K pritraktas aktualajn problemojn.

* * *

La komunista gazeto "Adelante", kritikante la diskurson de Kabaljero, diras: "Oni povas diri, ke post sia duskurso Kalbaljero konfirmas sian proksimiĝon al la sindikatista movado k sian fremdiĝon de la politiko de Popola Fronto kun la demokrataj partioj de la burĝaro, politiko unike ebla en Hispanio k antaŭ la mondo."

Komento superfluas!

* * *

La letero de kamarado Bas Wels, kiun ni presigis en la 5 n-ro estas represita traduke en "Katalunya" vespera katalunlingva liberecana ĵurnalo. Ankaŭ la gazeto "Libertaire" represigis ĝin.

* * *

En la mezo de Oktobro la Federacio de la Kamparanoj kunvokis en Valencio grandiozan kongreson. Estis pritraktitaj problemoj rilate al la pliintensigo de la agrikulturo.

* * *

"Solidaridad Obrera" malfermis subskribon favore al la hospitaloj, Ruĝkruco k la familioj de la kamaradoj pereintaj dum la okazaĵoj de Majo. La kolektita mono ascendas ĝis 163.504 pesetoj. Ĝi estis distribuita inter la familioj de la heroe falintaj liberecanoj.

---

vas servi al ni por instruo. K por pli bona ilustro necesas, ke alia kamarado faru raporton pri la SAT-kongresaj laboroj. Tiamaniere ni povus kompari k klare prezenti antaŭ la tuta laborista esperantistaro la perfidulojn k la verajn vizaĝojn de la historiaj demagogoj.

**BOR**

La diskurso de Largo Kabaljero, kies kvintesencon ni resumis en la 8 n-ro de In. Bul. estigis viglajn diskutojn. Nur la komunista gazetaro akceptis ĝin negative, insultante akre Kabaljero-n. Okaze de tio "Solidaridad Obrera" atentigas: "Tiuj, kiuj lin laŭdis, tiuj kiuj lin kalifikis kiel la hispana Lenin, tiuj kiuj volis aliigi lin en supernatura, estas la samaj, kiuj hodiaŭ kontraŭbatalas lin sange k fajre, makulas lin, insultas lin!"

* * *

La presejo de la liberecana gazeto "Juventud Libre" organo de la Ibera Federacio de la Liberecana Junularo, estis atakita de la policaro de Negrin k malpermese ŝlosita.

Jen ankoraŭ unu revolucia ago!

* * *

La gazeto "Esfuerzo", organo de la Kataluna Federacio de la Liberecana Junularo, estis malpermesita de la registaro.

K oni kuraĝas aserti, ke la registaro ne estas revolucia! La skeptikemo estas danĝera!

* * *

Dum la nokto 27 de Oktobro, kiam la kamaradoj estis dormantaj trankvile, ripozante de la taga laboro, neatendite estis sieĝita la Sindikatejo pri la Transporto de Barcelono k forigitaj el la ejo la laboristoj kiuj gardostaris en la sama.

La brutala ofensivo entreprenita kontraŭ ĉi sindikatejo k ĝenerale kontraŭ la organizaĵo C. N. T. estas io vere neimagebla. Neniam, eĉ en la plej malbonaj tempoj de premado, kiajn travivis Barcelono, estis registreblaj tiaj fiagoj.

* * *

**36 kamaradoj enkarcerigitaj en la malliberejoj de Vich de la Katoliko-Komunista registaro, deklaris 28an de Oktobro malsatstrikon, kiel protesto pro la maljusto, kiun oni elmontras kontraŭ ili.**

**Revoluciaj laboristoj, atentu pri la novaj despotoj!**

* * *

La 31an de Oktobro la esperantista organiza PUIL aranĝis feston en la salono Ateneu Popular de Gracia. Paroladetis k-do. Suriñach (Surinjak) poste estis prezentita la teatraĵo "La Versajla Kaptito". Psokologie ĝustarajn interpretojn donis la k-doj P. Casanoves en la rolo de doktoro Gustavo Morel k R. Güell en la rolo de Paulo Morel.

Ĝenerale la impreso pri la prezentita teatraĵo estis bona kvankam plenumita de amatoroj.

* * *

**La 25 kamaradoj, kiuj estis arestitaj ĉe la sieĝo de la Centra Revolucia Komitato "Escolapios" k kiuj estis metitaj dum monato je kompleta k rigora izoleco estis translokitaj al la Modela Karcero akuzitaj pro fantazia proceso. Pro spionaĵo k perfido.**

**Tiuj ĉi 25 junaj revoluciuloj, kiuj ĉe la fronto elpruvis sian antifaŝistecon, estas translokitaj al la karcero akuzataj pro perfido k spionaĵo! Kia sarkasmo! La spinoj k la prfiduloj kuzs la sincerajn revolucion!**

* * *

Oni komunikas al ni, ke en la administrejo de la Modela Karcero en Barcelono troviĝas danĝera subjekto, individuo sen skrupuloj, kiu subtenas intimajn interrilatojn kun la faŝistoj retenitaj en la strato Santaló.

La ĉeesto de tiu individuo en la administrejo de la

"POPOLA FRONTO", ORGANO DE LA KOMUNISTA PARTIO, DEKLARIS, KE "PRO LA PERFORTIGAJ PROCEDOJ DE LA REGANTOJ (T. E. DE LA KONSILANTARO DE ARAGON) MULTAJ VILAĜANOJ FORKURIS AL LA FAŜISTA TERITORIO".

NI PETIS AL LA RITORAJ REDAKTOROJDE LA GAZETO KONKRETAJN FAKTOJN. SED ILI SILENTAS. ILI ESTAS TOMBE SILENTANTAJ.

PRO KIO, SINJOROJ, SILENTADO? PRO KIO VI NE PREZENTAS ANTAŬ LA TUTMONDA LABORISTARO KONKRETAJN PRUVOJN PRI PERFORTIGAJ PROCEDOJ K PERFORTIGAJ KOLEKTIVIGOJ? PRO KIO VI NUR CINIKE DEMAGOGAS K KALUMNIAS?

Kun niaj plej profundkora deziro pri sukceso rapida k saviĝo antaŭ senhontega rabismo!

La delegato de FET-Komitato: A. Pâris.

EL SVEDIO. La Liberecana junularo de la Sindikatoj, membroj de A.I.T., entreprenas ek de certa tempo intensan kompanjon super sia registaro por sendo de armiloj al Hispanio. Ili postulas, ke la plej grandaj en la mondo armilfabrikoj de Bufors, kie laboras miloj da proletaj junuloj, devas produkti por la laborista Hispanio. Afiŝoj algluitaj sur la muroj tekstas: **Armiloj por Hispanio aukaŭ de Svedio. Tio estas por la futuro de la socia liberigo de la premataj klasoj.**

La kamaradoj de la liberecana esperantista grupo disvolvadas intensan k energian propagandon favore al la proleta Hispanio. K-do Adrian Persson signis rimarkindan peresperantan laboron. Li paroladis en la kongreso de S. L. E. A. super la subteno al In. Bul. k kiel rezulto kolektis 31 sv. kr. La grupo lotumis profite al In. B. k gajnis 25 sv. kr. Krome la monkolektado etendiĝis pli vasten k la kolektita sumo ascendas ĝis 170 sv. kr.

K-do Axelsson prozorgas la arangâdon de grandioza antifaŝisma ekspozicio. K-do K. Axelsson pro sia senlaca laboro elstaras kiel laboristesperantista aktivulo. La kamaradoj el la diversaj landoj devas energie k grandanime akceli lian aŭdacan entreprenon, alsendante ĉiuspecajn esperantaĵojn k antifaŝisman litereturaĵon.

Ni kore gratulas la Stokholmajn kamaradojn pro ilia aktiva peresperanta agado kontraŭ la faŝismo k por la laborista Hispanio k ni invitas samtempe la kamaradojn el la ceteraj landoj imiti tiun imitendan ekzemplon. Por la sukceso de la antifaŝismo. K por la triumfo de la socia revolucio.

EL STALINIO. La juĝprocesoj progreseme pliiĝas. Laŭ tre bone informitaj ĵurnaloj, estis ekzekutitaj dum 4 monatoj ĉirkaŭ 2.000 akuzitoj. En unusola tago estis kondamnitaj je morto 76.

# INFORMEJO

### ANTIFAŜISTOJ! ATENTU!

La esp. Klubo, la Hispana Helpkomitato k la Faksindikata ĉeforganizo en Sôdertâlje meze de Januaro arangôs ekspozicion antifaŝisman. Ni insiste petas ĉiuspecan materialon, ekz., librojn, broŝurojn, gatetojn, afiŝojn, flugfoliojn, insignojn, statistikojn ktp. Ni resendos la aĵojn, se estas dezirate.

Adreso: Karl Axelsson, Dâlgatan 7 B. nb. Sôdertâlje, Svedio.

K-do Rune Fredin, 24 jara, deziras korespondadi kun kamarad (in) o pri diversaj temoj. Adreso: Rune Fredin, Box 420 Kopparberg, Svedio.

* * *

K-do Alfred Melbye, Oslo, Tafierheims gl. 30 III, Norvegio tre deziras ricevi interŝanĝe je aliaj aĵoj esp. gaz. k bultenojn k aliajn bonfarajn k propagandajn glumarkojn eldonitajn en Hispanio. Respondo garantiata. Represo en aliaj hispanaj gazetoj k bultenoj dezirata.

* * *

Korespondenca Centro Internacia, Helmerstraat 22, Amsterdamo, havigas ĉiuspecajn korespondadresojn al la ĉiulandaj esperantistoj pri ĉiuj temoj. Petu detalojn!

* * *

Oni interesiĝas pri k-do Henriko Gront de Divizio Durruti. La sama estas petata skribi al k-do Arnold Schoultz, Svedio, Forserum.

## Deponejo "INFORMA BULTENO"

| | | |
|---|---|---|
| J. Huset | Barbastro | 5 p-toj |
| Irene Chance | Parizo | 20 fr. |
| R. Chapotot | Reims (Marne) | 10 fr. |
| Sylvabelle | Saint-Jeand Aulph | 5 fr. |
| Philippe | Saint-Jeand Aulph | 5 fr. |
| Toulgoat | Saint-Jeand Aulph | 5 fr. |
| Kolekto en la SEA kongreso | Stokholmo | 31 sv.kr |
| Michel Stanger | Stokholmo | 1 sv.kr. |
| Aksofilo | Stokholmo | 5 sv.kr. |
| Alf. Andersson | Stokholmo | 2 sv.kr. |
| Oskar Karlsson | Malmo | 5 sv.kr. |
| Carl Persson | Avesta | 3'5 sv.kr. |
| Edv. Gustavsson | Amal | 2 kr. |
| Bertit Akselsson | Vaŝtervik | 2 kr. |
| Arnold Schoulz | Forserum | 3 kr. |
| Ivar Aström | Vânnôs | 5 kr. |
| Nore Jonsson | Orebro | 2 kr. |
| E. Burnelle | Herstal | 7 kr. |
| G. Romero | Farlete | 25 p-toj |
| Wiktor Osbanto | Barcelono | 5 p-toj |
| J. Esteller | Nueno | 5 p-toj |
| J. Dimancha | Canada | 2 dol. |
| A. Bois | Mecé par Vitré | 10 fr.fr. |
| T. C. Klijn | Amsterdamo | 1 gul |
| H. Berg | Hoorn | 1 gul |
| G. Mannoery | Amsterdamo | o'50 gul |
| H. Liesen | Amsterdamo | o'50 gul |
| Huigen | Roterdamo | o'40 gul |
| D. v/d Kruyl | Amsterdamo | 1 gul |
| Joh. Vries | Roterdamo | 1 gul |

Al ĉiuj ni esprimas sinceran antifaŝistan dankon!

PER LA VIPO DE LA VERARO NI SILENTIGOS LA ULOJN, KIUJ PROVAS JETADI KOTAJON SUR LA LIBERECANAN MOVADON!

# LETERUJO

A. Pâris, Malakoff. Ni dankas al vi pro la frateca letero. Ni kronigas la decidon de F. E. T. Vi ricevados la bultenon interŝanĝe. Ni nekrologas pri la pereinta kamarado.

G. Jarossay, Cholet. Jes kamarado, ni scias tion. Ĉiuokaze tamen la faŝista gazetaro estas, k tre efike, bojkotebla de la laboristaro. Ne gravas la prestiĝo de la gazeto, sed la bona organizado de la bojkoto.

F. Fredin, Kopperberg. K-do, cinike mensogas k demagogas la komunistoj. Kiel en Hispanio tiel en Svedio, K. en ĉiuj landoj. Ni parolas kompreneble ne pri la veraj komunistoj. Pri tiuj—la preŭdokomunistoj. Ili mensogas, ke la hispanaj anarkistoj kolektivigas perforte k kiam ni petas de ili konkretajn faktojn pri perfortigaj agoj, ili kiel mortintoj silentas. Ekz. ni petis "Popola Fronto" ,on pri konkretigo, ĝi tamen evitis, motivante pro nepolemikemo.—Neniam la fortoj de C. N. T. k F. A. I. forprenis batalilojn de la fronto. La plimulto el la batalantoj ĉe la frontoj estas C. N. T. -anoj. Se la anarkistoj forprenas el la frontoj armilojn, tio signifus lasi siajn kamaradojn senarmilaj. Kiuj akuzas la liberecanojn pri tia ago, ili faras tion. La samaj tipoj, kiuj akuzas pro deviga kolektivigo.—Ni sendas al vi la petatan materialon.

Tage Lau-Kopenhago. Dankon! La gazetaĵo ricevita.

Bas Wels, Roterdamo... Dankon, kamarado/-K-do. B. (Osbanto) estas nia kunlaboranto.

F. B. T. ten Hagen, Amsterdamo. Ne, k-do, ĝis tiuj kamaradoj ne forlasas siajn kalumniojn k mensogojn kontraŭ ni, ni ne silentos. Ili ne estas laboristoj, sed etburĝoj. Laboristoj ne povas mensogi k kalumnii pri aliaj laboristoj. Ni konas la lupojn vestitaj en ŝaffeloj.

BS., Sof. Ĉio ricevita bonorde. Via k-do L. skribos baldaŭ. Li estas nun multege superŝutata per laboro k petas indulgon. Li interesas pri LV. Kie troviĝas?—Pri k-do Andres Ballestin nun ni nenion konas. K ne eblas kontroli.

Nu kiel pli detala informo sekvos letero de via k-do.

Fölke Rosen, Stokholmo. Dankon, k-do. La tre dika letero ni ricevis bonorde k atente notis ĉion. Ni gratulas vin pro via aktiveco. Ni uzos la Rot, adreson por nia k-do Bor.

Karl Axelsson, Sôdertâlje, Dankon, k-do la letero. Ni profitas vian raporton k presigas ĝin. Propagandilojn ni sendas pere de nia Pariza peranto. Rekre ne eblas, tial ke en la poŝtejo oni konfiskas tiaĵojn. Ni bondeziras al vi brilan sukceson pri la ekspozicio!

Adrian Persson. K-do la elmontrita lastatempe de vi aktiveco favore al "In. Bul." vere estas granda k laŭdinda. Vi cetere ĉiam laboras senlace por la disvastiĝo de la bulteno k la populariĝo de Esperanto inter la liberecanaj esperantistaj medioj. Ni ĝojas k dankeme grastulas vin, pro la organizita parolado pri "In. Bul." k pri la kolektita mono. La lasta estos uzata por la eldono de esperantlingvaj glumarkoj. — Eku la libera socio!

Gaston Plateau, Kasa Tadla. Ni notis la novajn adresajn Ni sendas al vi la libron "Colectivizaciones" de k-do Souchy. En ĝi estas pritraktataj tre detale la agraraj problemoj.

"Libera Mondo", Alcora. Gramatikoj ne plu estas ĉe ni. Ni alsendos al vi tiajn post trovo. Propagandiloj sendotaj kun la bulteno.

M. Tales, Fes. Dankon pro la res. kup. La bulteno sendata regule.

H. Johansson, Gôteborg. K-do, ni pliigas la kvanton. La petataj hispanlingvaj gazetoj sendotaj.

J. Cassin, Plouguerneau. Al via Valencia kamarado ni regule sendas la bultenon. Ankaŭ la sesa estas sendita. Ni korektas k vi estonte ricevados unuopan ekzempleron.

O. Kupperman, Esp. Bulteno, Generalitato, Barcelono. Samlingvano, dankon pro la letero, plena de kalumnioj k insultoj kontraŭ ni. Ne restas alio ol danki. Sed ni miras, pro kio vi ne parolas konkrete. Kiajn malverajojn ni diskonigis? Vi havas bultenon, dementu nin antaŭ la tutmonda laborista esperantistaro. K stampu nin kiel mensogantojn. Pro kio vi ne faras tion, se havas je via flanko la veron? Eble vi koleras pro tio ke ni aŭdacis diri la veron. Ho! ni ne kulpas tiaokaze. Ni ja devis diri ĝin. Cetere, pardonu nin pro la verdiro!

Arnold Schoultz, Forserum. Ni anoncas pri via konito.

M. Talés, Fés, Maroko. Sendata regule. Dankon pro la res, kup.

T. C. Klijn, Amsterdamo. K-do, via letero ricevita. Pardonu pri la eraroj, faritaj de ni en la noto de la mondonintoj. Nia ĝis nuna administranto Mas demisiis k la administracio ne estis en tre enviinda bonordo. Pario ne konas la kalkularton k ellasis multajn erarojn. Pro tio ankaŭ k-do Rasenberg devas indulgi lin. Tamen la nova administranto notis atente k zorgeme ĉion. Ni plue sendados al vi 50 ekzemplerojn. Revolucian saluton al la kamaradoj!

# LASTHORE

**La tutmonde konata laborista ĵurnalo Solidaridad Obrera portempe estas malpermesita de la registaro. La motivo: La Direkcio pri la Publika Ordo dissendis al la redakcioj komunikon presendan. Per ĉi komuniko oni informas, ke estas organizita atenco kontraŭ Komorera, la fama kamunista avanturisto. La bombo tamen eksplodis 500 metrojn malproksime de la aŭtomobilo de Komorera k pro tio la atenco rezultigis nenian domaĝon.**

**La redakcio de Solidaridad Obrera entreprenis enketon k konstatis, ke ne okazis eksplodo de bombo, sed temas pri eliĝo de lumgaso. Do la atenco kontraŭ la komunista gravulo estas fiktiva k verkita tendence por la famiĝo de la sama. Pro tiu aŭdaca ago de la redakcio de Solidaridad Obrera la policestro ordonis 10 tagan malpermeson de la sama.**

* * *

**El la Barcelona Karcero estis liberigitaj 8 (ok) pastroj.**

# Internacia angulo

Karaj amikoj liberecanoj, dum du jaroj ni fidelis ĉirkaŭ nia kara "Laboristo" k antaŭe ni kunagis en "Libera Laboristo". "La Anarkisto" (Japanio), "Esperanto Revuo" k "Laboristo" (Bulgario) por fine nun kolektiĝi ĉirkaŭ "Informa Bulteno", kiu, malgraŭ sia loka karaktero, hodiaŭ estas nia sola internacia organo. Nia propra kara organo!

Laŭ peto de ni la redakcio de In. Bul. bonvolis malfermi Internacian Angulon, en kiu ni divers-kontinentanoj povas renkontiĝi por informi unuj la aliajn pri niaj klopodoj, agadoj k aktivecoj — eĉ pri pasivecoj, se iu kuraĝas raporti pri tiaj, sed kredeble neniu volas fanfaroni pri sia pasiveco en tempo, kiu ne permesas oportunecon k nenion-faradon, ĉar, se la reakcio intencas nin engluti, ĝi tamen devas laboregi k sviti, ĉu ne, gek-doj?

Do, geamikoj, ni post nun diligente kunlaboros en nia "angulo". Ni sendos sugestojn, proponojn k konsilojn pri nia angulo. Ni sendos ankaŭ konvenan materialon, raportojn, sciigojn ktp., el ĉiu parto de la mondo. Ni faciligos la penan laboron pri tiu angulo por niaj redaktantoj en Barcelono.

Ni igu la angulon vere INTERNACIAN! En ĝi kunlaboru Nord- k Sudanoj, Orient- k Okcidentanoj, amikoj el teror- k hipokritaj demokratio, "arioj" k judoj, nigrflav- k blankuloj!

Do, al laboro, jen niaj manoj!

La anarka Esp-grupo de Sstokholmo.

LA SEKRETARIO

EL BULGARIO. La registaro kreis leĝon, laŭ kiu ĉiuj bulgaroj partoprenintaj la hispanan revolucion, estas punataj je 5 jara enkarcerigo. Tiu barbára leĝo estas aplikata eĉ al k-doj, kiuj havas simple interrilatojn kun hispanaj kamaradoj. La juĝsatrapoj ĵus juĝis je 4 jara enkarcerigo k-don pro tio ke estas ricevinta esperantaĵojn el Hispanio.

La neŭtralaj esperantistaj trubaduroj ĉekape de la mastodonto Ada klopodas altiri en la marĉon de la neŭtralismo la laboristajn esperantistojn. Al ili helpadas fervore la iamaj komunistaj esperantistoj, nunaj burĝoj.

---

Modela Karcero prezentas gravegan danĝeron por la enkarcerigitoj. Ni avertas la proletaron pro la okazebla. Estas ja indigna paradokso, ke en lojala Hispanio la antifaŝistaj batalantoj troviĝas enkarcerigitaj k administrataj de faŝistoj.

* * *

La 2an de 11 9 faŝistaj aeroplanoj tromotoraj bombardis Lerida-n, faligante plurajn bombojn. Kelkaj trafis la lernejon. Pereis 50 infanoj, kiuj troviĝis en la momento en la lernejo. Entuta numero de la pereintoj leviĝas ĝis 220. Post kiam la aeroplanoj faligis bombojn oni mitralis la civitanojn sur la stratoj.

Tiel civilazas la faŝistaj sovaĝuloj!

* * *

La Konsilantaro pri la Sindikata Unueco de la Aŭtotramoj de Barcelono donacis al S. I. A. 50.000 pesetojn kiel helpo al la viktimoj de la faŝismo.

EL DANLANDO. La norvega verkisto Nordhal Griegh paroladis en Kopenhago dum kelkaj konferencoj favore al la proleta Hispanio. Liaj intervenoj estigis grandan impreson k oni kolektis multajn donacojn. Inter la lastaj estas unu de la dana verkistino Karin Michaelis, kiu en letero adresita al Griegh, diras:

"Ankaŭ mi volas fari ion por la hispanaj infanoj. En la nuna momento tamen mi troviĝas en financa malfacilaĵo pro tio ke mi estis malsana dum la printempo k suferis operacion en Ameriko, kiu kostis al mi multon. Mi havas iun aĵon donacindan — unu juvelo tre valora, kiun mi akiris dank' al kelkjara ŝparado, ĉar mi volis posedi ĝin. Ĝi estas ora kolringo kun perloj k briliantoj, kiun juvelisto el Amsterdamo taksis 5.000 kr. k la perlojn 3.000 kr. Mi kredas do, ke oni povas akiri certan monkvanton, per kiu mi volas regali la hispanajn etulojn."

Kiu diferenco inter tiuj, kiuj helpas la celadon de la proleta Hispanio k tiuj, kiuj helpas al la perfidulo Franko!

EL FRANCIO. La Ĝenerala Konfederacio de la Laboro (C. G. T.) diskonigis la sekvantan manifeston:

"La administrada Komitato kunvenis la 19 de Oktobro k procedis al ekzameno de la situacio en-k eksterlanda. Ĝi prijuĝis la barbarecajn aktojn kontraŭ la ĉina popolanaro. Ĝi certigas, ke interpretas la sentojn de la granda plimulto el la franca popolo, ĝi deklaras, ke estas necese plifavorigi la francan publikon al tiu juĝo por bojkoti sisteme la komercaĵojn japandevenajn. La administra Komitata de C. G. T. invitas urĝe la konfederaciajn organizojn preni kiel eble plej baldaŭ ĉiujn mezurojn, por ke estu aplikataj ĉiuj decidoj prenitaj de la Internacia Sindikata Federacio, cele ke la bojkoto estu efektiva."

La Federacia Komitato de FET (Labor-Esperantista Federacio en Franclingvaj Regionoj, decidis apogi la hispanajn antifaŝistajn batalantojn k la esperantajn eldonojn. Okaze de tio la delegito de FET-Komitato A. Pâris adresis al nia redakcio la sekvantan leteron:

Mi ĝojas informi vin, ke Federacia Komitato de FET decidis alvoki la membrojn de l'Asocio al sin-ŝuldigo pri pago de ĉiu monata subteno, fiksota de ĉiu laŭ sia pagpovo, por la respublikanaj batalantoj en Hispanio k iliaj esperantaj gazetoj.

— Tiu subteno daŭros ĝis post fino de la lukto en Hispanio.

Ni petas, ke vi konigu tiun decidon pere de via gazeto al la esperantistaro, k per al vi eblaj rimedoj al la batalantoj en Hispanio.

Vi diru al ili, ke ilia nunaheroa lukto ne estos senutila, ĉar ni sentas, ke per ĝia daŭro mem, ĝi iom post iom ĉe iuj profunde plifortiĝas k ĉe multaj vekas senton pri internacia solidaro.

Vi diru al ili, ke pli k pli vekiĝas konscio en la popolamasoj de demokrataj landoj pri la neceso praktike helpi al la kamaradoj, kiuj nun defendas civilizacion kontraŭ faŝismo. Vi klarigu, ke eĉ cinika barbareco k pirateco de la faŝistoj helpas al tiu vekiĝo de sento pri solidaro.

Vi estas viktimoj de la fakto, ke tiu sento ankoraŭ ne forte kreiĝis, espereble ĝi sufiĉe frue k forte estiĝos, por ke la necesa helpo venu al vi. Tion ni kiel esperantistoj per ĉiuj eblaj rimedoj k per Esperanto mem akcelos.